# *Rusio kaj ?inio pledas por haltigi sankciojn kontra? demokratia Koreio.*



Moskvo, 10 okt (RHK) Rusio kaj ?inio pledis por ke la ?tata konsilantaro de UN, pritaksu la sankciojn altruditajn al la popola kaj demokratia respubliko de Koreio, la? informis la rusa ministerio pri eksteraj rilatoj.

La ministerio informis ke tiu ?i komuna sinteno estis adoptita post la kunsido okazinta inter la vicministroj de la tri landoj. Ili konsideras ke tiu ?i reviziado de la punoj, oportune, estas necesa kaj elstarigis la gravajn decidojn adoptitajn de Norda Koreio por la nuklea malarmi?o, la? raportis la televida ?eno Telesur.

En Seulo, la ministrino pri eksteraj aferoj de Suda Koreio, Kang Kyung-wha, informis ke ?ia lando esploras la eblecon haltigi la punojn kontra? la norda najbaro.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/173591-rusio-kaj-cinio-pledas-por-haltigi-sankciojn-kontrau-demokratia-koreio

# Radio Habana Cuba